# AMERICAN ESPERANTIST BULLETIN

VOL. 63B - NO.3 OCTOBER-NOVEMBER, 1948


## EANA PERDIS SIAN PREZIDANTON

Nia Asocio suferis grandan perdon per la subita morto de nia Prezidanto, Profesoro Edwin Leavitt Clarke, 15 Sept. Li estis revenanta de New York, kie okazis kunsido de la Plenumo Komitato de EANA 13 Sept., kaj mortis, kiam la vagonaro proksimiĝis al Winter Park, kie li loĝis kaj estis profesoro de sociologio en Rollins College. Ni esprimas nian sinceran kondolecon al S-ino Clarke kaj al liaj du filinoj kaj du nepinoj Li estis 61-jara.

Naskiĝinte en Westboro, Massachusetts, Edwin Clarke studis en Clark-Universitato, Worcester, kaj Columbia-Universitato, New York, kie li doktoriĝis. Li fariĝis Esperantisto en 1908, kiam li hazarde trovis numeron de "Amerika Esperantisto" sur benko de stacidomo. Li instruis Esperanton en Clark-Universitato, Universitato de Minesoto kaj en Rollins College, kie Esperanto-klasoj havas saman valoron por la fina atesto kiel lecionoj en aliaj lingvoj. En Minneapolis li ankaŭ estris Esperanto-radio-kurson, kunlaborante kun D-ro Lehman Wendell kaj aliaj. De 1929 li estis Prezidanto de la Ekzamena Komitato de EANA. En 1946 la Kongreso en Conway, kiun li ĉeestis, elektis lin VicPrezidanto de la Asocio. Iom poste li fariĝis Prezidanto. Li donis daŭran moralan kaj financon subtenon al EANA kaj estis en kontakto kun multaj gesamideanoj. Li pasigis la someron en South Westport, Maine, kaj prezidis kunsidojn de la Plenuma Komitato de EANA en New York en Junio kaj Septembro, kiam li trapasis la urbon.

Profesoro Clarke multe laboris por plibonigi kaj plikompletigi informojn pri Esperanto en enciklopedioj. Li faris la ĉefan laboron pri la Alvoko al Kolegioj, kiun EANA publikigis en 1947. Li proponis kaj organizis la uzon de Esperanto por la "Alvoko al la Popoloj de la Mondo", kiun la Konferenco pri Mondregistaro en Rollins College alprenis en 1946. Lia memoro restos por ĉiam en la Esperanto-movado.

Profesoro Clarke verkis multajn librojn kaj broŝurojn pri sociologiaj, edukaj kaj religiaj temoj. Li estis Sekretario de Florida Voters League kaj unu el la fondintoj de la Inter-Rasa Komitato de Winter Park, membro de la Amerika Sociologia Societo, la Asocio pri Eksterlanda Politiko kaj multaj aliaj organizoj.

* * *

As hoped, the new book, "ESPERANTO -- THE WORLD INTERLANGUAGE" has been instrumental in making new esperantists - and new EANA members. Interesting to note, it has also been effective in bringing back into active Esperanto life some old-time esperantists. To illustrate, Mr. LEE HERBERT, an active esperantist 20 years ago in England happened to see the new book in a New York book store. Enthusiastic once again, he purchased the volume, found the address of EANA there, paid a personal visit to EANA, and before leaving, was a paid-up member of the North American Esperanto Association.

* * *

In the last issue of the Bulletin we failed to mention the name of "nia juna samideano en Spokane". We were refering to BERNARD HAAG, a Membro-Subtenanto of EANA, who certainly deserves proper recognition for his energetic work in promoting Esperanto in his high school.





## LOOK AHEAD TO CHRISTMAS

**SEND THIS JOLLY SANTA TO ALL YOUR FRIENDS**

You can solve your Christmas card problems and further Esperanto at the same time with these unusual and attractive greetings. The green star Santa Claus who says "Saluton" is printed on high grade white stock with matching green deckle edge. The white envelope also has a green deckle flap, and is 4 3/4" x 6 1/2".

You can get these cards immediately at these specially reduced prices: 12 for $1.75, 24 for only $3.00. Order from the American Esperantist, 114 West 16 Street, New York, N.Y.


## PRI PERSONOJ

T. EDWARD CUSHING, malnova samideano, instigis serion de bonaj leteroj pri Esperanto en la "Boston-Herald". Lia unua demando estis: Kio pri Esperanto? Li rakontis pri lia amiko, D-RO D.D.LOWELL, lernejestro de la fama Roxbury Latin School --kaj pri la Esperanto-movado en tiu tempo. Post lia letero sekvis vera abundo da leteroj, kiujn la ĵurnalo publikigis en du-tri diversaj eldonoj. Respondoj kaj komentoj venis de GEO. W.BAILEY, WOODBURY BURD, ROBERT ALBERG kaj ALICE HUGHES TAYLOR. Rezultas granda intereso pri Esperanto, kaj EANA ricevis multajn leterojn kiuj petis informon. Kaj kio okazas?: S-ro Bailey brave laboras pri leteroj, kaj konsiloj. S-ro Cushing fariĝis subtenanta membro de EANA, du aliaj novuloj aliĝis kiel subtenantaj membroj. Kelkaj bibliotekoj en la regiono ricevis tiom da petoj pri Esperanto, ke ili devis aĉeti la novan libron por sia stoko - kaj ni certe atendos eĉ plian sukceson. Sinceran dankon al ĉiuj supre!

Antaŭnelonge vizitis la Centran Oficejon familio de skorpioj! Dumviva Membro de EANA, VAN ALLEN LYMAN, vizitis kaj montris al ni vivantan patrino-skorpion kun proksimume dudek idoj sur ŝia dorso. La idoj loĝas tie ĝis ili povas iri kaj serĉi sian propran manĝon. S-ro Lyman estas zoologo, kaj li tute sentime tenis la skorpion en la mano. Feliĉe, estis malvarma vetero kaj S-ino Skorpio ne montris emon piki per sia longa, danĝera vosto. Sed ankaŭ-feliĉe-la skorpio-familio ne ankoraŭ loĝas en la Centra Oficejo!

Letero de F-ino PRINCESS O. JONES, antaŭe de Oklahoma City, kaj nun de Kansas City, informis nin, ke ŝi ankoraŭ interesiĝas pri Esperanto, kaj disdonas flugfoliojn kie ajn ŝi troviĝas.

La pasinta 22a de Aprilo, 1948, nia samideano FRED L. BROENING, de Baltimore, Maryland, edziĝis kun F-ino BEATRICE SHEPHERD, kaj ili nun loĝas en Essex, Md. Koran gratulon al la novaj geedzoj.

## PRI LIBROJ

The Central Office carries a complete line of books of every description. Here are some de luxe and fine gift suggestions:

LA SANKTA BIBLIO, finest de luxe edition, Persian yapp, limp circuit leather, round corners, gold stamped, India paper and full gilt edges. A superb edition. . . . . . $ 5.50
LA NOVA TESTAMENTO, finest de luxe ed. (as above). . . 2.85
LA SANKTA BIBLIO, Art vellum, India paper, cloth. . . . 2.50
HUNGARA ANTOLOGIO, bound edition, stamped in gold. . . 5.35
ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO, special cloth bound, gold. . . . 5.65
SVISA ANTOLOGIO, full cloth bound, stamped in gold. . . 5.35
SVEDA ANTOLOGIO, complete in one vol., cloth bound. . . 4.65
TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILO, de luxe leather bound. . 3.00
VIVO DE NIA SINJORO JESUO, Dickens, ill. and bound. . . 2.50
JARMILOJ PASAS, Haeffker, 2 vols. in one bound book. . .4.00
RIGARDU LA TERON, (Van Loon's Geog.) special bound. . . 5.60
FINE! MI KOMPRENAS LA RADION! Aisberg, fine bound. . . .2.40
PRI L'MODERNA ARTO, 100 pp, 68 pp Art, bound ed.. . . . 2.35
PLENA VORTARO, 2nd ed., deluxe paper & bind., real printing, much superior to offset edition; while they last. . .6.75
PLENA VORTARO, 2nd ed., cheaper photo-offset ed.. . . . 4.00
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, (Pub. price $3). . .2.50
EN OKCIDENTO NENIO NOVA, Remarque, beautifully bd.. . . 2.50
AKBAR, Brouwer, an Oriental romance, fine cloth bd.. . .2.00
INFERIO, Bulthis, modern novel, excel. print. & bd. . . 1.85
PALACO DE DANĜERO, Wagnalls, romance, beautifully bd. . 2.00
LA GRANDO AVENTURO, Szilagyi, bound edition. . . . . . 2.35
GOSTA BERLING, Lagerlöf, very fine ill. cloth ed. . . . 3.25
MEDICINA VORTARO, Briquet, 360 pp., green cloth bd.. . 2.65
THE WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Pei, (incl. ESP.) bd.. . . 6.00
KONCERTA KANTARO, 80 pp music notes, Esp., 8"x 12". . . 1.75
LA KURSO DE ANDREO CSEH, 3a eldono, complete, boxed. . .6.00

AMERICAN ESPERANTIST
BULLETIN

114 WEST 16 STREET, NEW YORK 11, N.Y.
EDITOR: George Alan Connor
STAFF: H.S.Harris, H.M.Harrison, Evelyn Kromberg, W.Vathis

# Let Us Follow His Example

Elsewhere in this issue is an account in Esperanto of the passing of our beloved President, Edwin L. Clarke. His extensive and fruitful efforts for the promotion of Esperanto have earned for him an honored place in the annals of the Esperanto movement. His example will long continue to inspire others to do their best in the cause he so ably represented.

It will be difficult to replace him, because of his many services for EANA. We must elect a new President with something of his fervor and enthusiasm. Someone must be found who will take over the Examinations Committee. Other professors in the colleges of America must be encouraged to establish official credit-courses in Esperanto, such as he conducted at Rollins College. And all of us, together, must follow through with his plan for an adequate Sustaining Fund for EANA.

Fortunately, we have a capable Vice-President, Dr. W. Solzbacher, who after unanimous request of the Board of Directors consented to serve as Acting President until the next election. Dr. Solzbacher is profoundly versed in Esperanto, and he has had experience in every phase of the movement on two continents. We welcome him as our provisional President.

To fill the vacancy in the Executive Committee, the Board of Directors unanimously requested Joseph Leahy to continue as a member of that body, which he has so loyally served these past years.

To make up the seven members of the Board of Directors, as required by the Constitution, the Board unanimously requested Joseph R. Scherer to serve until the next election. The fact that Mr. Scherer received the third largest number of votes in this year's election of two Directors made him the logical choice. (See tabulation of votes elsewhere.)

Professor Clarke headed an important Executive Session at the Central Office only three days before his death. All members of the Executive Committee were present, and many important matters were passed upon which will be presented to the Board of Directors.

The chief concern of our President was for an adequate Sustaining Fund for the Central Office. He left New York with plans for personally conducting a campaign among the members of EANA, to make the "10¢-a-day" campaign add up to a real mass movement for funds which could assure the success of the program for building a Central Office, for publishing the "American Esperantist", and for increasing the tempo and effectiveness of Esperanto promotion in America.

Members will recall that he initiated the "10¢-a-day" plan. He always faithfully contributed over three times that amount by contributing $10 each month as a member of the Sustaining Board. He believed that while a few members could afford to send $10 each month, a majority of the entire membership could readily sacrifice a modest "10¢-a-day".

Let us realize his plan! Let us call each dime a "brick" for the construction of a great American movement. Perhaps a majority could afford to give "a brick a day" - others could send "bricks" as they find dimes available for contribution. We can record the progress of the plan in our official organ. A response with a check, from every member who can possibly afford it, would be the perfect "answer"-and a most fitting tribute to the memory of "Our President".

## ELEKTO DE ESTRARANOJ

Jen la rezulto de la balotado por Estraranoj, 1948. La unuaj du ricevis la oficojn. Joseph Leahy 92, G. Clayton 84, Joseph Scherer 16, Joseph Murray 14, Lydia DeVilbiss 1, nuligita 1. Kontrolis: William P. Vathis, Lola Mae Muse.

* * *

Senpaga, ilustrita broŝuro en Esperanto pri la vilaĝo Volendam estas havebla de la adreso: H.L.Hartog, Volendam, Netherlands.

* * *

"Unu Mondo - Unu Lingvo" estis la temo de deklamo pri Esperanto, kiun JOHN P. HILL de Prince George, Kanado, faris en la Seminario de Kristo la Reĝo, Katolika Kolegio. La prelego gajnis la unuan premion en jara konkurso de la Seminario. Rezultas intereso pri Esperanto en la tuta regiono. Gratulon!

# LA AGLO-OKULO VIDAS



Ŝajnas al ni, ke la esperantista publiko, inkluzive de gazetredaktoroj kaj legantoj, ne bone scias sian historion de nia kara lingvo. Ekzemple, oni multe pridiskutas la aferon pri la enkonduko de Esperanto en ĉiujn lernejojn de iu lando malgranda, kiel Islando aŭ Aŭstrio, tiamaniere plifaciligante la enkondukon en ceteraj landoj. Oni aldonas, ke la lando tiel sukcesos estos la unua tiuspeca lando en la mondo. Ne rigardu nun, sed okaze de tia sukceso, ĝi estos la dua lando. Ĉar, jam en la jaro 1910, la greka insulo de Samos laŭleĝe enkondukis Esperanton devige en ĉiujn lernejojn de la lando! Tiutempe, Samos estis sendependa lando, regita de princo. Nur bedaŭrinde por nia movado la leĝo post iom da tempo nuliĝis, pro tio ke la insulo denove fariĝis parto de Grekujo.

Ankaŭ ni vidas en "Heroldo" artikolon pri esperanta hundo --"la sola konata esperanta hundo en la mondo". Eĉ dum nia malgranda vivo esperanta, kaj neniam vojaĝante alilandon, kie troviĝas pli multe da gesamideanoj, ni scias pri tri hundoj kiuj komprenis Esperanton--sole en Usono. Nia kore amata Pastro Fazel havis tian hundon; li verkis pri ĝi por la tiama Skolta Bulteno. Ankaŭ nia globtrotulo, S-ro J. R. Scherer, posedis hundon, "Skippy", kiu estis bone konata al multaj gesamideanoj. Kaj la plej dorlotita estaĵo, ĉu homa, ĉu besta, en Suda Kalifornia estas "Amiko", kiu troviĝas ĉe la familio Chomette en Los Angeles, kaj kiu komprenas nenion krom Esperanton! Efektive, tion ni persone spertis.

Dum la pasinta jaro, Aglo-Okulo estas leginta multajn esperantajn librojn, inter ili kvar antologiojn. Do, kun la memoro pri la libroj ankoraŭ freŝa, ni elektas la al ni plej interesajn verkojn. Unuavice ni elektas la Svedan Antologion, kaj due, la Svisan. La du ceteraj libroj , la Ĉeka kaj la Hungara , estas bone redaktitaj, sed ili ne tiom katenas nian intereson kiom la du antaŭemenciitaj verkoj. Aĉetu ilin de la Centra Oficejo.

## PRI KURSOJ

ELMIRA, N.Y.: S-rino E.E.Smith daŭre instruas Esperanton al la gejunuloj de Elmira. Jam multaj personoj lernis la lingvon internacian de ŝi. Ankaŭ la tiea klubo estas aktiva kaj oni eldonis diversajn poŝtkartojn pri tiu urbo.

BROOKLYN, N.Y.: Nia samideano, Floreal Conchado de Brooklyn, daŭre propagandas kaj instruas Esperanton inter la hispanlingvanojn de la Nov-Jorka metropolo. Parolado pri Esperanto de li farita ĉe bankedo rezultis je klaso ĉe la Grupo Salmeron. Ankaŭ D-ro Carlos Rodriguez Jimenez, sekretario de la Delegacio de Venezuelo je la UNO, aŭdis kaj aprobis la paroladon. D-ro Jimenez laŭdis la ideon de Esperanto kaj promesis lerni la lingvon por helpi sin en sia laboro je la UNO.

## LIVERPOOL UNIVERSITY AWARDS ESPERANTO PRIZES

Liverpool University, England, awards regularly the John Buchanan Prizes in Esperanto. There are three of them available every year, each of the value of 25 pounds (about $100). The contest is open to students and graduates of any approved university in the British Empire. This would make a number of our Canadian readers eligible. Particulars may be obtained from the Registrar of Liverpool University.

* * *

THE SWISS BROADCASTING CORPORATION has published an interesting brochure. With pleasure we note that Esperanto programs are listed with the portraits of the Esperanto announcers, Dr. Edmond Privat, Professor at the University of Neuchatel, and Artur Baur, chief editor of the "Svisa Antologio".

## CRUC-VORTA SOLVO

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E | S | T | A | S | ■ | T | I | E | ■ | A | Ĉ | E | T | I |
| B | I | R | D | O | ■ | I | E | L | ■ | L | A | T | E | R |
| O | D | O | ■ | L | I | A | ■ | E | S | T | R | A | D | O |
| N | I | ■ | A | V | O | ■ | A | K | R | E | ■ | T | A | N |
| O | S | T | R | O | ■ | A | R | T | O | ■ | F | O | S | I |
| ■ | ■ | I | O | ■ | U | R | B | O | ■ | K | A | J | ■ | ■ |
| I | D | O | ■ | T | R | I | O | ■ | K | O | R | N | O | J |
| A | U | ■ | S | E | Ĝ | O | ■ | D | I | R | U | ■ | N | E |
| M | O | D | E | R | A | ■ | T | R | A | E | ■ | L | I | N |
| ■ | ■ | I | L | O | ■ | K | I | E | L | ■ | L | A | ■ | ■ |
| F | I | N | O | ■ | K | A | R | N | ■ | K | A | U | R | I |
| U | M | A | ■ | R | A | N | O | ■ | I | O | N | ■ | I | N |
| R | A | M | P | A | N | T | ■ | V | A | N | ■ | I | S | T |
| A | G | A | O | J | ■ | O | N | I | ■ | A | T | A | K | E |
| Ĝ | E | R | M | O | ■ | N | U | N | ■ | T | E | N | O | R |

PHOTOGRAPHS
POSTAGE STAMP SIZE
Glossy Perforated Gummed
from any size foto.
Personalize your Cards,
Gifts, Letters, Invitations
Foto returned unharmed
Grey, per 100, $2.00
Colortoned, $2.50
Joseph Leahy
1754 Lanier Place, N.W.
Washington 9, D.C.
WE TAKE SUBSCRIPTIONS
FOR ALL MAGAZINES

# BOOK RENTAL SERVICE

## Supplement to Catalog of 1946

The Book Rental Service of EANA was established in 1941, in order to make available to members of the Association, at a minimum of cost, a wide variety of reading in the world interlanguage, including many items which are not often found on the private book shelf of the average Esperantist. Year by year the library thus made open to users of the Rental Service has been added to, through fresh purchases or by gifts from members, until at present it includes well over 700 titles. Many of these are works no longer obtainable by purchase anywhere.

The smaller publications, rated as booklets rather than volumes, are not rented individually, but are combined together into "Groups" of usually three to five items each. The numbered manila envelope containing any given Group is rented on the same terms as though it were a single book.

In order to become a user of the Rental Service, one must make the initial deposit of one dollar with the Director of the Service, at the following address:

E. G. Dodge
1471 Irving St., N.W.
Washington 10, D.C.

The rental fee for one book or one Group is 10 cents up to four weeks, and 5 cents for each additional two weeks or fraction thereof. These rentals will be charged against the initial deposit while it lasts. The user of the service pays postage in the return direction only. Book rate in the United States is 4 cents on the first pound, then 3 cents each additional pound.

The principal available catalog of the Book Rental Service is contained in the July-August number (1946) of the magazine AMERICAN ESPERANTIST. In that catalog the material is classified under eighteen general classifications, and these are further subdivided into sections. Copies of the 1946 catalog are still available at 25¢ each, by addressing either the Director as above, or the EANA office in New York.

The present Supplement sheet lists the books which have been acquired and new booklet "Groups" established since the main catalog was published. It is hoped that the now increased facilities of the Book Rental Service will lead to many new registrations on the part of prospective users.

### I. (Sections 1-3) ESPERANTO LESSON BOOKS

COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (334 pp.) Ivy Kellerman (Reed). Adapted to collegiate language students more especially.

LA TUTA ESPERANTO (172 pp.) Henrik Seppik. The very best grammatical exposition for advanced students, not yet "experts".

ĈU KATINO? (Booklet and six diagrams) H.W.G.Cenijn. Bizarre method for drill on the "table words".

G-144. ELLERNU (110 pp.) Szilagyi. Conversation based on humorous pictures, for rather advanced students. LA VERDA KORO, an easy romance of Esperantist life in Siberia by Julio Baghy, designed for aid of beginners.

G-145. A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, Szilagyi. English edition, fully illustrated. INTERNACIA FRAZARO, Kenngott. INTERNACIA DIALOGARO, Kenngott. Also Prof. Kenngott's LECTURE.

DICTIONARIO COMPLETO DE ESPERANTO (278 pp.) Portuguese.

G-143. Four lesson books for Portuguese learners of Esperanto.

CURSO FUNDAMENTAL DE ESPERANTO (60 pp.) For Spanish learners.

### I. (Sections 4-6) OTHER WORKS ON THE LANGUAGE AND MOVEMENT

BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO (560 pp.) 1929

DOKUMENTARO DE ESPERANTO (198 pp.) D-ro A. Mobusz, 1921.

TUTMONDA ADRESARO DE ESPERANTISTOJ (130 pp.) 1947

ESPERANTA TEKNIKA MEDICINA VORTARO (359 pp.) Dr. Briquet, 1932.

KOMERCA VORTARO (93 pp.)

G-129. Add to previous contents "MARY KAJ SULO", an interesting imaginary correspondence between an English girl and a Finn.

G-131. Parts Two of seven yearbooks of IEL, containing Esperanto "vortaroj" on technical subjects -- army, aeronautics, children's games, radio, music, philately, legal terms.

G-139. BILDOTABULOJ POR LA INSTRUADO DE ESPERANTO; and ZAMENHOFAJ VORTOJ; and English-Esperanto Dictionary (small) Harris.

G-140. ESPERANTO SHORTHAND (Pittman system) ESPERANTO IN COMMERCE (Pittman series) ESPERANTO, ITS AIMS AND CLAIMS (1930). LESSON PICTURES IN ESPERANTO, Marshall and Mann. GUIDE TO ESPERANTO, Fred Hamann. KONVERSACIA VORTARO, Cseh. VERSFARADO KAJ RIMARO (1909). NOTES ON ESPERANTO PRONUNCIATION, from British Esperanto Association.

### II. PHILOSOPHY AND RELIGION

LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO (425 pp.) Tr. by Braga fr. French of Alan Kardec. Interpretation of teachings of Jesus, from standpoint of reincarnation and spirit growth.

G-42. To previous contents, add RELIGIAJ CIRKONSTANCOJ EN SVEDUJO, written from Catholic standpoint.

G-102. HEBREA KALENDARO, Bianchini. ISLAMO ESPERANTISTE RIGARDATA, Colin Evans. LA PROBLEMOJ DE LA VIVO, by Krishnamurti, Theosophist. KVAKERISMO. Three small brochures relative to BAHAISM.

G-132. MIA MESMISTERO, meditations to accompany the mass. LA ORIGINO DE PROTESTANTISMO, by a Japanese Catholic. KATOLIKAJ KUNVENOJ, and UNUA INTERNACIA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ.

G-133. VOJAĜO INTERNE DE MIA ĈAMBRO, Xavier de Maistre. NOVA HOMARO (with subtitle: "La Universala kaj la Kosma Amo") Petro Danov. LA ETERNA EVANGELIO, by a Finnish pastor. RAKONTOJ EL LA BIBLIO.

G-146. Six Catholic publications: ESPERDONA ISLANDO; NOVA AFRIKO; UNIVERSALA REĜECO DE JESUO KRISTO; KRISTO KAJ LA LIGO DE NACIOJ; LA ORIGINO DE RELIGIO, from an Anthropologist's standpoint; LA HIPOTEZOJ PRI LOURDES.

### III. SCIENCE (INCLUDING MATHEMATICS AND GEOGRAPHY)

LA BREDADO DE ABELOJ (102 pp.)

AŬSTRALIO (94 pp., illustrated) by an Australian and a Finn.

G-147. Two brochures on higher mathematics, by Prof. Dombrovski: PRI NOVAJ TRIGONOMETRIAJ SISTEMOJ, and PRI UNU SPECO DE KURBAJ LINIOJ (non-euclidean).

### IV. ECONOMICS AND GOVERNMENT

G-138. LA SENDANĜERECO DE FRANCUJO (158 pp.) Andre Honnorat, 1924. LA ORIGINO DE LA MONDMILITO, Karl Helfferich, Berlin, 1915. KONTRAKTO DE LA LIGO DE NACIOJ, English, French, Esperanto. CIVITANOJ DE L'MONDO, Yervant H. Iskender, "fondinto".

### VI. TRAVEL AND ADVENTURE

MI SERĈIS ORON KAJ OLEON (132 pp.) David Flood. Adventurous life of a Swede in "Usono, Kanado, kaj Alasko".

G-145. LA VIVO DE L'ESKIMOJ; LA ASCENDO DE MONTO BLANKA; UNUA VOJAĜO ĈIRKAŬ LA MONDO; RAKONTOJ PRI NEDERLANDO.

### VIII. SHORT STORY COLLECTIONS

LA GRANDA AVENTURO (143 pp.) Ferenc Szilagyi.

G-136. NOVAJ BULGARAJ RAKONTOJ; MATEO FALCONE KAJ ALIAJ RAKONTOJ (french); NIĈJO MENSOGULA KAJ ALIAJ NOVELOJ (Romanian); NORDA VENTO NOVELKOLEKTO (Hungarian); LEGENDOJ (Polish); BENGALAJ FABELOJ.

G-148. GARBOJ; LA PATRO; EPIZODO DE MILITO; LA ĈASO AL DIABLO.

G-150. INTERNACIA LEGOLIBRO (123 pp.) compiled by K.Kenngott. ESPERANTA LEGOLIBRO (112 pp.) Setälä; PREMIITAJ RAKONTOJ (96 pp.).

### IX. ADVENTURE FICTION

LA RADIANTA LOTUSO (193 pp.) Weird and startling adventures of the Dalai Lama in Tibet and embalmers in Egypt; tr. from Dutch.

MORTO DE TRAJNO (256 pp.) Detective romance, tr. from English.

X. FANTASTIC FICTION

SALTEGO TRANS JARMILOJ (192 pp.) Original, Jean Forge. Marvelous invention enables several to revisit in person the age of Nero.

MI EN LI (191 pp.) from the Czech. A macabre and weirdly impossible tale, in which two or more souls exchange bodies.

XI. HISTORICAL FICTION

FABIOLA (436 pp., illustrated) Tr. from Cardinal Wiseman. Persecution of Christians in Rome, in the 4th century.

XII. PROBLEM FICTION

VIVO VOKAS (179 pp.) Esp. original by Stellan Engholm. Young people in present day Sweden; (sequel to "Infanoj en Torento".)

D-RO DORNER (208 pp.) Original in Esperanto by H.L.Egerrup, a Danish physician. The delicate subject of artificially induced pregnancy is treated skillfully and without offensiveness.

G-142. ABISMOJ (150 pp.) Jean Forge, Esp. Orig. Unusual art form, portraying the nethermost tragedies of several lives. LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO (65 pp.) An idealistic legend of India, Stefan Zweig. Tr. by Helene Wolff.

XIII. UNCLASSIFIED FICTION

TRI HOMOJ EN BOATO (256 pp.) Humorous adventure in England, tr. from the English of J.K.Jerome.

G-137. BATALO PRI LA DOMO HEIKKILA, a story of old Finland. LA SONĜO DE MAKARO.

XIV. DRAMAS

G-120. Three plays of Shakespeare: HAMLET, MACBETH, ANTHONY AND CLEOPATRA. (For other Shakespeare plays, see G-37 in the 1946 Catalog.)

G-125. Original plays in Esperanto. To the six previously announced in this group, add TARCIZIO.

G-149. LA BOTISTOJ (142 pp.) and amusing comedy from the Finn. and a drama entitled KNOCK.

XV. EPIC AND NARRATIVE POEMS

EŬGENO ONEGIN (235 pp.) Illustrated. The chief poetic romance of the Russian, Pushkin. In rhymed stanzas.

G-93. To the items listed under this number in the Catalog of 1946, add LA PATRO DE PESTULOJ EN EL ARISH, tr. by Grabowski.

XVI. LYRIC POETRY

EL PARNASO DE POPOLOJ (228 pp.) a notable work of 1913 by Antoni Grabowski. Beside his original poems, it contains his translations from thirty languages.

G-34. Esperanto originals by four authors: VERDKATA TESTAMENTO, witty verse (121 pp.) by Raymond Schwartz; TRA L'SILENTO, Edmond Privat; FAJRO KURACAS, Eŭgeno Miĥalski; MIA POEZIO, Rafael de San Milan Alonso.

XVII. (Section 3) WORKS BASED ON YOUTH INTEREST

G-135. LONDONANIDOJ (98 pp.) School games and contests, written in Esp. by a 14-year old boy. KUDLAGO, MALGRANDA ESKIMO. And PATRINO ANSERINO, based on Mother Goose, written by a very precocious American girl.

XVIII. MISCELLANY

LIBRO DE L'HUMORAĴO (195 pp.) 1908. Illustrated.

ARTHISTORIO (100 pages text, 112 pages pictures) Antono Hekler, translated by K. Kalocsay.

ORIENTA KURIERO (Jan. to July, 1939) Six numbers stapled together, of illustrated magazine edited by Chinese.

---

## Deziras Korespondi

Kosto: Eksterlande- 2 resp.k.; Enlande- 5 cendoj -1 vorto.

BULGARUJO: Nikola Ivanov, Opalĉenska 97, Sofia. 27-jara advokato dez. kor. kun amerikanino.

ĈEKOSLOVAKIO: Miloslav Zvara, Dominikanska 6, Plzen. 23 fraŭloj (18 gis 30 jaroj) dez. kor. kun gajaj fraŭlinoj. Skribu al kursgvidanto supre.

ĈEKOSLOVAKIO: F-inoj Maria kaj Jitka Zahourova, nam. dr. E. Benese 4, Karlovy Vary-Rybare. 21-j. Maria kaj 16-j. Jitka dez. kor. kun ĉiuj Amerikaj landoj.

FRANCUJO: Louis Marcque, 68 rue de la gare, Desvres, Pas de Calais. Dez. kor. kaj interŝ. pk. Nepre respondos.

GERMANUJO: S-ino Hedwig Rappe, 20a Hannover-Ricklingen, Grunlinde 8, (Brita Zono). Dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

GERMANUJO: Franz Mayer, (16) Ronshausen 140, B. Bebra Kr. Rosenburg a. Fulda, Hessen, (U.S.Zono). 60-j., perdinte cion, mi petegas plej-kore per amsendaĵo (Nutraĵo kaj uzitaj vestoj).

GERMANUJO: G. Habellok, Dimpfel. str. 32, 10 Leipzig, N 24, Sachsen (Rusa Zono). Petas pri nutraĵa kaj vestaĵa helpo por familio de tri infanoj.

GERMANUJO: Paul Heinrich, 20a Hildesheim, Ludwigstr. 7, Niedersachsen, (Brita Zono). Dez. kor. kun ĉiuj landoj. Mi certe respondos.

HUNGARUJO: D-ro Balint Szemenyei, Huba str. 38, Oroshaza. Dez. kor. kaj interŝ. pm.

ITALUJO: Bruno Giannini, v. Spinola 3, Bussana, S. Remo. 20-j. kemia studento dez. kor. Ne interesiĝas pri pm aŭ pk.

JAPANUJO: F. Egami, Prof. de Biokemio, Kemia Instituto, Scienca Fakultato, Nagoja Universitato, Ĉikusa-Ku, Nagoja. Dez. kor. kaj ricevi sciencajn librojn en interŝ. kun japanaj objektoj.

---

AMERICAN ESPERANTIST BULLETIN
114 WEST 16 STREET, NEW YORK 11, N. Y.
Return Postage Guaranteed

Sec. 562, P.L.&R.




S-ro Jan Poplawski
Zakret 9
Poznan 8, Poland

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL